“Mi konfirmas al vi la apogon de la Partio kaj Ŝtato de Vjetnamio al la disvolviĝo de la enlanda kaj monda Esperanto-movado, ...”

Vicprezidantino de Vjetnamio Nguyễn Thị Doan

ke alpreno de la angla alportos prosperon (kvazaŭ tiel jam okazus en Filipinoj!).

La demando supozeble staras: ĉu ni deziras prezenti nin ĉefe kiel movado por amikeco aŭ ĉu ni povas antaŭenigi Esperanton plej grave sub la devizo de la socia kaj lingva demokratio?

Ni danku ankoraŭfoje

Kiel movado, ni havas ankoraŭ kialon por esti dankemaj al la vjetnamiuj aŭtoritatoj.

Kompare kun aliaj landoj lastatempe, ne estis malfacile por azianoj kaj afrikanoj ricevi vizon por la UK, do la sola malfacilaĵo por ili estis la monrimedoj.



*La Komitato de UEA dufoje
plenkunside kunvenis en Hanojo
glate kaj laborcele.*

Ekzemple, la Komitatano por Burundo, Jérémie Sabiyumva, povis partopreni en sia unua UK. Krome partoprenis 14 indonezi-anoj, 12 ĉe UK la unuan fojon.

Glate kaj helpeme

Mi ne rimarkis malglataĵojn en la aranĝoj. Nu, oni ne kutimas ĝeniĝi pri malfruoj en varmaj landoj. Tamen, troviĝis amasego da gejunuloj-helpantoj por direkti kaj gvidi kongresanojn.

Foje mi aspektis kredeble iom perpleksa pri la vojo al la ĝusta kunvenejo, kaj senpetite aperis ĉe mia flanko junulino, kiu montris al mi la vojjon. Tiaj etaj okazaĵoj estas unu el la memorindaj impresoj el la Hanoja UK.



De supre: Heidi Goes prelegas pri la rekonstruado de la movado en Indonezio. Meze: Humphrey Tonkin prelegas pri la ideologia bazo de la Esperanto-poezio. Sube: Vjetnamaj gejunuloj-helpantoj dancas ĉe la Fermo.



Unu aparte ĉarma junulineto, laŭ la nomo Ĝojo – studinta Esperanton dum nur ses monatoj – gvidis unu mian ekskurson. Ŝi brave baraktis kun la lingvo, sed ĉian mankon oni volonte pardonis pro la infekte ridema ĉarmo de ŝia personeco. Alia gvidistino, iom pli aĝa, tre kompetente parolis.

La lingva kapablo de la multaj helpantoj tre variis. Foje mi demandis pri aĉeto de poŝtkarto; tiun vorton oni scipovis, sed la vorto 'poŝtmarko' restis ankoraŭ lernenda.

Belartaj Konkursoj

En la Belartaj Konkursoj de UEA, Timothy Carr gajnis la trian premion en la kategorio Poezio pro "La Arto de la Poezio".

Akva pupteatro

Interesa artaĵo, aparta de Vjetnamio, estas akva pupteatro. Pro la speciala loko, akvohava kaj malgranda, la plimulto de la spektintoj spertis ĝin en la vjetnama lingvo, sed grupeto bonŝancis sperti prezenton en Esperanto.

Libroj por vjetnamoj

Dank' al unuopaj donacintoj, ĉiu vjetnama aliĝinto de la Hanoja UK ricevis donackuponon je la valoro de 900 mil dongoj (t.e. ĉ. 36 eŭroj) por aĉeti en la Libroservo de UEA.

*

Mi ne rakontis multe pri la laboro de la kongreso, sed tion vi espereble priligos aliloke.

Geoffrey Sutton



Surstrate en Hanojo, Jérémie Sabiyumva el Burundo aĉetis lokan ĉapelon ĉe sia unua UK.

• **Sonorilejoj de Royston anoncis la 'Unuan Libron'**

La historio komenciĝis en 2009, kiam Terry Page kaj Roy Threadgold faris specialan sonorigadon por festi 150 jarojn depost la naskiĝo de Zamenhof. Tiutempe ili kredis, ke ili estas la

solaj esperantistoj-sonorilistoj en Britio, sed ĉi-jare en Edinburgo ili trovis trian, Matt Peperell, kaj – kiel jam raportite en *Update* – ili trioje kuntiris la ŝnurojn unuafoje tie en Edinburgo.

Ili decidis aranĝi specialan prezenton por la 125a datreveno

de la 'Unua Libro'. Royston elektiĝis kiel taŭga loko. Helpe de kvin lokuloj ili faris 'Kvaron-sonorigon' (*Quarter Peal*) en la unike angla sonora sistemo (*Change Ringing*). Dum 48 minutoj la loĝantoj de Royston aŭdis 1 250 malsamajn permutaĵojn per la metodo nomata Jorkŝira Surprizo.

Jen certe la unua fojo kiam tri esperantistoj faris tian agadon. Ĉu ankoraŭ unu sonorilisto kaŝas sin en Esperantujo?

Aperis raporto pri la okazaĵo en la fakgazeto *The Ringing World*.

• **Gubbins – first English novel**

Paul Gubbins, editor of our sibling magazine *La Brita Esperantisto*, has recently had his first novel in English published by New Generation Publishing (ISBN 978-1-909039-490). Many congratulations!

Laddies and Generalmen is reported to be both "witty and topical" – which is perhaps why it doesn't feature Esperanto (although the language does "have a small walk-on, walk-off part"). The appearance of the novel does, however, seem to confirm our Paul does 'have a life' somewhere else out there in the wilds of Neesperantujo.

Paul has offered to sign your copy if you bring it to an Esperanto event (alternatively you might wait to acquire a remaindered copy at a charity shop!).

• **La filmo *La universala lingvo en israela televida programo***

Okaze de la 125a jubileo de Esperanto, la prestiĝa israela televida programo "Roim olam" elsendis fine de julio parton de la filmo *La universala lingvo* de Sam Green. Gian Piero Savio kaj Amri Wandel subtekstis ĝin hebree.

• **Lingva demokratio virtuale**

(www.ipernity.com/doc/32119/12863030/in/album/274503) estas nova virtuala albumo konsistanta el – ĝis nun – 34



Bildo de koridoro de la kongresejo dum la Universala Kongreso en Hanojo

RETE KAJ LETERE

BY E-MAIL AND LETTER

• **Singing for Zamenhof**

Dear All!

I think you may like to see my essay "Singing for Dr Zamenhof" that appears on the greyhares website (www.greyhares.org/singing-for-dr-zamenhof). In it I recall my long-term faith in Esperanto, beginning as a school-boy in Britain in the 1940s.

Graham Dukes
Oslo, Norway



• **www.universitato.info**

Estimataj!

Bonvenon al la retejo www.universitato.info por la Universitato de Esperanto. Ĉi tie vi trovos la filmojn de la lecionoj

jam donitaj dum la sesioj de la Universitato de Esperanto. La unuaj kursoj okazis en januaro kaj februaro 2012.

Se vi estas instruisto kaj jam instruis vian kurson nacilingve en la kadro de akreditita universitato, vi povas instrui ĝin ankaŭ en Esperanto. Ĉiujn lecionojn de la Universitato de Esperanto oni filmas kaj poste metas en la interreton, senpage, sub la licenco de Krea Komunumaĵo. Kontakto nin por pli da detaloj: keefeinchina@gmail.com.

Se vi estas studento, vi povas ĝui kaj studi kompletajn kursojn pri diversaj temoj en Esperanto. Nun estas du temoj: kurso kiu pritraktas militon kaj alia nomita 'Historio kaj Filozofio de la Informadiko'.

Dennis Keefe,
Nankino, Ĉinio

UEA-kotizoj por 2013



Kerna servo de UEA estas organizi la ĉiujaran **Universalan Kongreson de Esperanto** (UK) tra la mondo, je kies kotizo individua membro ricevas *rabaton*. UEA funkciigas ankaŭ la plej grandan libroservon de Esperantaj libroj (pli ol 4 000 diversaj libroj kaj varoj). Plena katalogo kaj rekta mendebleco ĉe ttt-paĝaro www.uea.org/katalogo. Individua ano de UEA rajtas mendi ĉe la **Libroservo de UEA** kun **rabato de 10%**! (Membro kun Gvidlibro aŭ Jarlibro ricevas la rabaton por du mendoj jare, aliaj por ĉiu mendo.) Plej grave, UEA agadas por Esperanto sur la monda scenejo. Por pli detalaj informoj, oni konsultu la **Jarlibron de UEA** kaj la **revuon Esperanto**, kiujn ricevas individua membro.

Fariĝi individua membro de UEA

Eblas pagi por individua membreco rekte al UEA per kreditkarto (Visa, Eurocard, Mastercard, Access aŭ American Express), al nederlanda poŝtgira konto 37 89 64 (Den Haag) aŭ al la banko Bank Mees Pierson, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam, Nederlando (konto 25.52.89.804).

Alternative, oni povas pagi al la brita Peranto de UEA, kiu akceptas britan ĉekon aŭ poŝtmandaton kondiĉe ke ĉi tiu estas skribita al 'EAB', kio ebligas pagi ankaŭ kotizon al EAB samtempe: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887; retadreso: eab@esperanto-gb.org. (Oni ne sendu britan ĉekon rekte al UEA.)

En la okazo se vi estas **nova membro**, bonvolu doni viajn plenajn nomon, adreson kaj, se vi havas **29 aŭ malpli da jaroj**, ankaŭ vian naskiĝjaron*. Ĉiuokaze bonvolu klare indiki la celon de la pago. Por aniĝi oni ne postulas plenigon de oficiala formularo.



Kotizoj de UEA por 2013

MG/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado	£8
MJ(-T*)/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo <i>Kontakto</i> sen plia abonpago)	£21
MA(-T*)/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) + <i>Esperanto</i> 11-foje ...	£52
SA/Simpla abonanto al la revuo <i>Esperanto</i> sen membreco	£33
Kto/Abono al la revuo <i>Kontakto</i> 6-foje, sen membreco	£20
SZ/Societo Zamenhof: aldona, mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon	£104

Servoj: Kongresaj aliĝoj kaj aliaj pagoj

La Peranto (EAB) povas akcepti pagojn per debetkarto (prefere ol per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA, por kiuj celoj la administreto de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. La Peranto kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri librokatalogoj.

Aliĝu frue al la **UK en Rejkjaviko**, Islando, por ricevi **maksimuman rabaton**: €180 antaŭ la 31a de decembro por anoj de UEA, sed €225 por nemembroj.

☆ **Universala Esperanto-Asocio**: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. 00-31-10-436-1044; fakse: 00-31-10-436-1751; rete: uea@co.uea.org; sekretario@co.uea.org; financoj@co.uea.org; kongresoj@co.uea.org; uk.mendoj@co.uea.org; libroservo@co.uea.org; ttt-paĝaro: www.uea.org

dokumentoj, parte du aŭ tri-lingvaj (Esperanto, la franca, foje la angla), laŭvole uzeblaj en diversaj cirkonstancoj kiel virtuala ekspozicio, de afiŝetoj A4, de dokumentoj aldoneblaj al retpaĝaroj, enretigeblaj ĉe Facebook ks.

Aliaj temoj (ĝis nun): Lingva imperiismo (www.ipernity.com/doc/32119/12858337/in/album/27425020 dokumentoj); Rio+20 (www.ipernity.com/doc/32119/12849378/in/album/274105 Eŭrobabelo / Eurobabel); (www.ipernity.com/doc/32119/12836569/in/album/273947).

Por pli komforte legi, ne uzu la tro rapidan funkcion Diaporama, sed iru rekte al la indikita reteja adreso, kaj sur la suba parto de la dekstra panelo de vinjetoj, alklaku la sagon kun pinto dekstren, kiam vi volas vidi sekvan bildon (du sinsekvaj sagoj kondukas al la lasta bildo; la sistemo funkcias ankaŭ inverse).

• **Guardian** podcast on Esperanto anthology in English Editor Paul Gubbins and publisher Clive Boutle appeared on a *Guardian* podcast (www.guardian.co.uk/books/audio/2012/jun/29/books-podcast-minority-language-literature), concerning the publication of *Star in the Night Sky* on 29 June (see page 5 of this issue).

• **'Pola retRadio'** el Hanojo Ankaŭ ĉi-jare Barbara Pietrzak pretigis disaŭdigojn kadre de la Pola retRadio rekte el Hanojo, ekde la 29a de julio. Ili elŝuteblas ĉe la adreso: <http://retradio.posterous.com>. Tiu de la 6a de aŭgusto enhavas i.a. la sonversion de ŝia kongresa raporto, kiun ŝi prezentis kiel la Ĝenerala Sekretario de UEA. Tiu de la 7a enhavas interparolon kun Mark Fettes pri la plursesia traktado de la kongresa temo. Li ankaŭ prezentas la tekston de la rezolucio (vidu paĝon 1).

• **Jagelona Universitato okazigis internacian perretan kurson**

En junio okazis la jam pli frue anoncita oficiala 20-hora, internacia, lingvoperfektiga

Esperanto-kurso de Jagelona Universitato, Pollando. Ĝi disvolviĝis plene en interreta studejo, realtempe. Al la kurso

Daŭrigo sur paĝo 17



© Royal Mail Group Ltd 2012, courtesy of The British Postal Museum & Archive

Hilary Chapman estas bone konata pro sia emo ĉirkaŭfosi en polvoplenaj arkivejoj. Li antaŭ nelonge raportis la interesan kaj eble surprizan fakton, ke la kompanio Harrison & Sons proponis al la brita poŝto desegnon por poŝtmarko kun la vortoj 'Olimpaj Ludoj' en Esperanto feste de la Olimpiaj Ludoj de Londono en 1948 (vidu <http://postalheritage.wordpress.com/2012/07/25/olympex-2012-collecting-the-olympic-games/>).

Keep up with all the latest news!

In addition to *La Brita Esperantisto* and *EAB Update* we like to keep members informed of new developments and events via the EAB website and Twitter. We also occasionally send out information to our members and supporters via e-mail. Are you missing out? We'd like to ensure we have your current e-mail address, so if you'd like to receive these occasional updates please send an e-mail to eab@esperanto.org.uk, using the subject line 'include me'. If you don't wish to be included on the mailing list, but simply want to tell us your current e-mail address, please use the subject line 'my e-mail address'.

Gift Aid

If you are a UK taxpayer and haven't already done so, we would be pleased if you could complete a Gift Aid Declaration. This will allow us to reclaim tax on your gifts and subscriptions, at no extra cost to yourself. The Gift Aid scheme is relevant to anyone who pays UK income tax on income, investment or pensions; it allows EAB to reclaim 25p for every pound you give. If there comes a time when you no longer pay tax, please let the EAB office know. To ensure we hold the correct details for you, please complete the online Gift Aid Declaration form (on the EAB Membership section of the website in the 'membership application' section). Alternatively, ask Viv or Emma to send a hard copy to you. We can confirm your current Gift Aid status with us by e-mail if you're unsure whether you've already signed one or not.

La renkontiĝo de JEB en Liverpolo

www.jeb.org.uk

La 22an de junio 2012 Lkomenciĝis en Liverpolo la somera renkontiĝo de la Junularo Esperantista Brita (JEB), en kiu partoprenis ses homoj el kvar nacioj. Ĉar la partoprenantoj ne estis tiom multnombraj, oni decidis uzi la apartamenton de la lokano Agneau Belanyek kiel amasloĝejon kaj kiel la ĉefan renkontiĝejon. Dum la tago ne multe okazis, ĉar la partoprenantoj alvenis dum disaj horoj. La tiamaj prezidanto kaj vicprezidanto Daniel White kaj Carlos Castellani renkontiĝis posttagmeze en drinkejo apud la trajna stacidomo por tie atendi la alvenon de la aliaj kaj por diskuti pri la sekva renkontiĝo de JEB, kiu okazos en Belfasto inter la 29a kaj 30a de septembro. Proksimume je la 18a horo la kvar partoprenantoj kiuj ĉeestis iris al la domo de Agneau por vespermanĝi, ripozi kaj pretiĝi por la nokta parto de la programo, kiu estis noktumado en la urbo.

Je la 23a horo ni estis jam kvin kaj tiam ni iris al dancejo, kiu nomiĝas Bumper Bar por danci, drinki kaj amuziĝi. La nokto estis vere agrabla, kaj estis kelkaj sufiĉe interesaj okazaĵoj, kiuj inkluzivis frenezan frapulinon kaj miskomprenajn policistojn, tamen laŭ konsilo de la lokano Daniel pli bonas ne rakonti ĉion, ĉar laŭ li tio, kio okazas en Liverpolo, tio restu en Liverpolo. Do, ĉirkaŭ la 4a matene ni prenis taksion hejmen, kaj tiel finiĝis la unua tago de nia renkontiĝo.

Sabaton posttagmeze alvenis la lasta partoprenanto, kaj ni finfine komencis pli oficiale la renkontiĝon. Ĉe nia renkontiĝejo (la domo de Agneau) la tiama prezidanto kaj lokano Daniel



Ne prakavernuloj sed (de maldekstre) JEBanoj Martin Minich, Paul Roberts, Carlos Castellani kaj Neil Roberts pozas en la fama Liverpola muzikejo The Cavern. Ne vidiĝas kunpartopreninto Daniel White, kiu fotis.

White prelegis pri la skaŭsa dialekto, tiu 'lingvo', kiun oni parolas en Liverpolo kaj kiun neniu alia komprenas. Tuj poste li gvidis nin al ekskurso tra la urbocentro kaj al la marbordo, kie ni vizitis kelkajn famajn lokojn kiel Walker Art Gallery, St. George's Hall kaj la nacia muzeo de Liverpolo. Post vespermanĝo en sandviĉa restoracio ĉiuj revenis al la domo de Agneau denove por ripozi iomete antaŭ nia sabata noktumado, kiu okazis en la fama The Cavern, klubo, kie komenciĝis la muzika kariero de The Beatles. Tiel finiĝis la dua tago de nia renkontiĝo.

Dimanĉon matene, kiam ĉiuj vekigis, okazis komuna debato pri religioj tra la mondo. Tiu estis sufiĉe interesa, ĉar, kvankam ni ne estis multnombraj, tie ĉeestis

anoj de diversaj religioj kiel la kristana, budhana, bahaana, kaj ĉeestis ateisto. La debato daŭris preskaŭ horon kaj estis sufiĉe fruktodona. Estis paroloj pri Dio, ne-Dio, scienco, meditado, misteroj de la universo, kaj en la fino oni parolis eĉ pri eksterkorpaj spertoj. Post tiu tre bona mateno ni tagmanĝis en la urbocentro kaj tuj ekiris al proksima urbeto ĉe la maro, kiu nomiĝas New Brighton, kie ni libere ekskursis dum kelkaj horoj, antaŭ ol la homoj devis reveni al Liverpolo por preni trajnojn reen al siaj urboj. Ĉirkaŭ la 18a horo ni oficiale fermis la renkontiĝon en la trajna stacidomo de Liverpolo, kaj tiel finiĝis la lasta tago de nia tre agrabla renkontiĝo en la skaŭsa lando.

Carlos Castellani

aliĝis esperantistoj el 5 landoj de 3 kontinentoj: Brazilo (3), Urugvajo, Katalunio, Nederlando kaj Kongolo (Kongo Brazzaville). Tio inkluzivas du instruistojn de superaj lernejoj.

La studentoj ricevis oficialan atestilon de la universitato pri partopreno. La universitato fieras pro la diversaj formoj de Esperanto-instruado, kiujn ĝi realigas jam dum pluraj jaroj, kaj pro la eksterlandaj partoprenantoj.

(Informis Maria Majerczakla, kursogvidantino.)

• *La Stampa* pri Herzberg

La 29an de julio en la granda itala ĵurnalo *La Stampa* (eldonkvanto: 400 000) aperis artikolo pri Herzberg am Harz 'la Esperanto-urbo'. Laŭdire ĝi inteligente traktis Esperanton kaj la apartan manieron, laŭ kiu ĝi estas esplotata en tiu urbo.

• Gvidiĝi en Brazilo Esperante

Laŭ raporto, la Ministerio de Turismo de Brazilo nun rekonas Esperanton kiel laborlingvon. Kion tio signifas, ne estas ankoraŭ klara al ni, sed s-ino Laura Pereira de Alcântara estas la unua brazila profesiulo, kiu aperigas la Esperanto-flagon sur sia nova identigilo de loka turisma gvidisto.

• Indiana kooperativo uzas Esperanton kiel laborlingvon

Grupo Cooperativo de las Indias (Kooperativa Grupo de Indianoj) estas transnacia kooperativa reto dediĉita al kreado, scio, retoj, produktoj kaj servoj por memstarigi homojn, komunumojn kaj organizaĵojn per pioniraj iloj, kiuj plibonigas la daŭripovon kaj resaltemon de iliaj projektoj. Fondita en 2002, ĝi laboras nun en Latina Ameriko (Montevideo kaj Bonaero) kaj Eŭropo (Madrido kaj Bilbao). La grupestra kooperativo – la plej fama – estas *Sociedad de las Indias Electrónicas*. Ĝi kreis diversajn novaĵojn, i.a. la unuan entre-

preno-blogon en la mondo aŭ retservojn pri libera programaro. La plej granda enspezo de *Sociedad de las Indias Electrónicas* venas el konsilado al diversaj grandaj organizaĵoj, fondaĵoj kaj registaroj pri organizado, teknologio kaj soci-ekonomia disvolvado. Laŭ Manuel Ortega, en "La Indiana Kuriero":

"Interne nia lernado de Esperanto elstare kaj rapide progresas, Esperanto pli kaj pli estas la indiana lingvo. Ni volas profiti la okazon danki al ĉiuj, kiuj diversmaniere alprenis la taskon diskonigi nian decidon ekuzi Esperanton kiel laborlingvon kaj al gratulintoj.

"Kial Esperanto estas la indiana lingvo? Jen Esperanto, sinteza lingvo kiu estas, sendepende de nia origina kulturo,

perfekte lernebla dum unu ĝis du jaroj post intensa lernado. Por simila rezulto en natura lingvo ne malproksima al nia familia lingvo necesus pli ol dek jaroj."

• Brazila entreprenista iniciato

Intraespo (Monda Organizo por la Disvolvado de la Esperantista Ekonomio) estas brazila iniciato, kiu celas arigon de entreprenistoj kaj memstaraj profesiuloj, jam scipovantaj Esperanton kaj interesigantaj pri la tutmondiĝo de la ekonomio. Oni konstatas, ke Esperanto-entreprenistoj kaj profesiuloj ĉiukampaj restas izolitaj. Intraespo sin prezentas per nova strategio: disponigi subtenon pere de institucia stimul-agentejo, kiu starigos mondan reton de lokaj oficejoj, foje filioj, foje licencitaj oficejoj.



Elkorajn gratulojn! Arnold Pitt, el Leominster, kaj Kamila Waliczek el Zielona Góra, Pollando, geedziĝis en Leominster la 18an de aŭgusto. La paro renkontiĝis dum Esperanto-feriado en Mielno, ĉe la pola-balta marbordo. Kompreneble Arnold ne scipovas la polan lingvon, kaj Kamila ne scipovas la anglan, sed ili komunikas per la Internacia Lingvo. Ili intencas loĝi parte en Pollando kaj parte en Britio.

- **Kunveni en Armenio**

Ni ĝojis ricevi ĉe la Brita Kongreso en Edinburgo viziton el Armenio. La 6a Mezorianta Kunveno okazos ĝuste en Erevano, ĉefurbo de Armenio, de la 29a de marto ĝis la 2a de aprilo 2013. Ĝi estos "laŭkutime malmultekosta". Pliaj informoj aperas sur la retpaĝaro de UEA: <http://uea.org/vikio/>; retadreso: mezorianta.kunveno@esperanto.org

- **Artista Datumbazo**

Tiel nomiĝas reta portalo, kreita por kunligi artistojn, teknikistojn kaj organizantojn por faciligi organizadon de kulturaj aranĝoj

- **El Herzberg – la 'Esperanto-urbo' de Germanio – tri aŭstraj esperantistoj staras ĉe la nova placo Esperanto, okaze de la 64a kongreso de fervojistoj-esperantistoj en la urbo.**



(muziko, teatro, literaturo, video, fotado, desegnado kaj pli). Ĝin oni fondis en 2003, kaj nun revigligata de nova

kunlabora teamo, ĝi troveblas ĉe www.artista.ikso.net; retadreso: artista@ikso.net.

Esther Schor and Sho Konishi join ESF's Advisory Board

Two more scholars from prestigious universities have joined the advisory board of the Esperantic Studies Foundation (ESF). Both have worked or are working on research projects linked to Esperanto.

Esther Schor, Ph.D.

Esther Schor is Professor and Associate Chair of the Department of English at Princeton University. She received her Ph.D. from Yale and taught briefly at Tufts University and Barnard College, Columbia University. She specialises in British Romanticism, teaching courses in Romantic Poetry and Poetics, Romantic Historicism, Romantic Drama, and Travel Literature; active in the programme in Judaic Studies, she also teaches American Jewish Literature, Introduction to Judaism and Yiddish Literature in Translation. Her other strong teaching interest is Biblical studies (the Bible as Literature; Bible Criticism and Theory). Her biography, *Emma Lazarus*, won the National Jewish Book Award. She is the author of *Bearing the Dead: The British Culture of Mourning from the Enlightenment to Victoria* and the editor of the *Cambridge Companion to Mary Shelley*. She co-edited *The Other Mary Shelley: Beyond "Frankenstein"* and *Women's Voices: Visions and Perspectives*. Her most recent volume of poems is *Strange Nursery: New and Selected Poems*; her current project is a cultural history of the Esperanto movement.

Sho Konishi, Ph.D.

Sho Konishi is a historian at Oxford University. He completed most of his undergraduate education in Russia. He earned his Ph.D. in the History Department and the Divinity School at the University of Chicago, and served as a postdoctoral fellow at Harvard University. He is currently a university Lecturer in the Faculty of History and the School of Interdisciplinary Area Studies at Oxford University, where he also serves as a Governing Body Fellow and the current Senior Tutor of St Antony's College. He is also Faculty Fellow of the Nissan Institute of Japanese Studies, Oxford.

His current research interests include epistemology, the transnational history of emotions, anarchist natural science and ethnography, and he has a particular interest in the place of language in the history of human knowledge production. His publications have covered a broad range of themes in Japanese and global history, from Esperanto, agriculture, art and aesthetics, science, to world order, revolution, anarchism, entomology, and religious thought and practice.

- **Novajo por scienc-amikoj**
En Hanojo, la nova estraro de ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista) povis dum la Faka Forumo prezenti la modernigitan eldonkoncepton de *Scienca Revuo*. Ĝi estas unu el la plej longedaŭraj Esperantlingvaj periodaĵoj (ekde 1949). Se vi interesiĝas legi aŭ verki sciencajn artikolojn en Esperanto, registriĝu en la retejo <http://scienca-revuo.info>.

- **Volontula Servo profitis**

El la Aŭkcio ĉe la Hanoja UK, kie kiel kutime Humphrey Tonkin sprite rolis kiel la aŭkciisto, la Volontula Servo de UEA ricevis 1 303 eŭrojn.

- **Survoje al la 7a Azia Kongreso**

Por britoj, la venonta Azia Kongreso de Esperanto pli proksimas ol kutime, en Israelo. Jam aperis la Unua Bulteno por la 7a Azia Kongreso, okazonta en Jerusalemo de la 18a ĝis la 22a de aprilo 2013. Ankaŭ la turisma vojaĝplano de la antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj haveblas. Ili krome troviĝas en la retejo de Esperanto-Ligo en Israelo (www.esperanto.org.il/ak2013), kiu lastatempe ampleksigis siajn porjunularajn paĝojn. □

Regulaj kunvenoj en Liverpola

Liverpola Esperanto-Rondo regule kunvenas ĉiumonate. La junia kunveno okazis kune kun la Sud-Lankaŝira Grupo.

Ili kutime renkontiĝas en kafejo 'Esperanto', sed ĉar tiun tagon la kafejo estis rezervita por aranĝo de lernejfinantoj, ili iris en alian, samstratan, lokon, kie ili bone manĝis. (Iam tiu hotelo Liver estis regula renkontiĝejo de lokaj esperantistoj.)

Por la estonteco, oni interkonsentis daŭrigi kunvenojn en kafejo 'Esperanto' ĉiumonate la trian sabaton (je 13h00). Se okazos, ke tiutempe la kafejo ne estos uzebla por ni, ni transiros al The Liver Hotel. Tiel okazis por la sekva, julia kunveno.

Reveninte al la urbocentro, partoprenantoj babilis kaj trinkis en Hotelo Hilton. Post tio ili iris al la Liverpola Katedralo por vidi 'Esperanto'-brikon (bildo dekstre supre) sur 'The People's Path' (La Irejo de la Popolo). Dekstre, Vivienne, Richard kaj Brendan staras sur la Irejo.

Fine ili eniris la katedralon por tie aŭskulti orgenan koncerton, trinkis en la katedrala restoracio kaj rigardis art-eksponon.

Raportis Peeter Aitai.



Londona Klubo lanĉos

La 'oficiala' lanĉo de la literatura antologio *Star in a Night Sky* okazos vendredon, la 16an de novembro, je 19h00, en London Irish Centre, Camden, kadre de la tiusemajna renkontiĝo de Londona Esperanto-Klubo. Estos tre bonvenaj tie ĉiuj interesitoj, kiuj afable sin antaŭe anoncu al lek.sekretario@gmail.com.



↩ Ankoraŭ unu maniero aŭskulti prelegon ĉe UK!

New Members of EAB

Nathaniel Brawn, London
James Daniell, Margate
Philip Gibson, South Shields
G.C. Neatham, Lochgelly

Deceased members

Christopher Gwatkin, Welling
Charles Newman, Westcliffe-on-Sea
W. Sinclair, Beeston
Jim Voiels, Southport

CONGRATULATIONS

Completed the Free Postal Course

David Mannon, Longlevens

枣庄学院
**Universitato de
Zaozhuang varbas
internaciajn
studentojn**

Universitato de Zaozhuang situas en suda parto de provinco Ŝandongo en orienta Ĉinio kaj estas registrita de Ĉina Eduka Ministerio. Sub la universitato estas 18 institucioj kun 41 bakalaŭraj fakoj kaj 38 kolegiaj fakoj, inter kiuj estas taŭgaj por internaciaj studentoj kiel la ĉina lingvo, literaturo, belartoj, ĉina historio k.s.. La instruaj lingvoj estas Esperanto, la angla, franca, japana kaj korea.

Tie jam laboras kaj studas esperantistoj el Japanio, Koreio kaj Nepalo. Ni bonvenigas ĉiujn esperantistojn viziti nin kaj interŝanĝi kun ni. Bonvenu studi en Universitato de Zaozhuang kaj interŝanĝi kun ni. La perado de varbado de studentoj estas bonvena.

- Retadreso: semio@163.com.
- Tel. 86-632-3786905.
- Hejmpaĝo: www.uzz.edu.com

**Festi jarfine ĉe la
29a Internacia
Festivalo**



Dortmund, la 'enirpordo' al la Rura regiono, bonvenigas vin! Partoprenu en internacia rondo de 100 ĝis 150 personoj el ĉirkaŭ 20 landoj; ĝuu la faman etoson de la Internacia Festivalo!

Komforta domo urbocentre kun belaj salonoj kaj etosoplana trinkejo ofertas al vi agrablan restadon.

- **Kontaku** Hans-Dieter Platz: HDP@internacia-festivalo.de (www.internacia-festivalo.de).

Kulturdomo Greziljono invitas

Kastelo Greziljono invitas vin al sia aŭtuna familia feriado, kiu okazos de la 27a de oktobro ĝis la 3a de novembro.

Estos paroliga progresiga kurso; rektmetoda kurso por veraj komencantoj; ateliero pri muzika improvizado kaj kunludado kun viaj muzikiloj; mantro-ateliero: konatiĝu kun via voĉo; 'Prelegoj pri ia granda lando' de Svetlana Smetanina; Akordiona koncerteto de popola muziko.

Pliaj detaloj en <http://gresillon.org/autune/>, kie eblas ankaŭ perrete aliĝi.

Kulturdomo de Esperanto, Château de Grésillon, FR-49150 St-Martin d'Arcé; retadreso: kastelo@gresillon.org; tel. +33-241891034



Ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, oni lanĉis la novan kolekton de dek unu originalaj eseoj de naŭ aŭtoroj, premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA

PRI HOMOJ KAJ VERKOJ. Eseoj pri la Esperanto-kulturo. Redaktita de Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari, kun postparolo de Nicola Minnaja. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2012. 143 paĝoj. 16 x 24 cm. ISBN 978-92-9017-116-4.

Mendu de EAB: £7,10 + sendokostoj de 20% = £8,52

ENHAVO:

• Humphrey Tonkin: *Enkonduko: Literaturo kaj interliteraturo.* • Eva Tófalvy: *Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo: la verkisto.* • Lena Karpunina: *Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn: kelkaj pensoj pri*

Esperanto-literaturo, ĝiaj legantoj kaj eldonejoj. • Carmel Mallia: *La Vojo.* • Krys Ungar: *Ĝoje sonu mia kanto: la vivo kaj verkoj de Marie Hankel.* • Sten Johansson: *Kiel legi – ĉu legi – Stellan Engholm?* • Eva Tófalvy: *La du testamentoj de Sándor Szathmári.* • Gonçalo Neves: *La lirika itinero de Miguel Fernández.* • Sten Johansson: *Bohemia amoro: Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová.* • Alberto García Fumero: *Arkaika parolado en Esperanto.* • Jukka Pietiläinen: *La kvara periodo en Esperanta literaturo.* • Geoffrey Sutton: *Pri la periodo de la Esperanta literaturo.*